# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

EN LA NUMERO:

Tagoj de la E-kulturo „Sofio' 82"

•

Dimitrov kaj Germanio

•

En Kartvelio

•

Porpacaj voĉoj

•

Internacia konkurso de Botev-poezio

•

Organiza vivo

•

Enlanda movado

•

Bulgaraj naciaj parkoj



JARO 51 • N-RO 7 • JULIO • 82

# NEELĈERPEBLA TREZOREJO




Salutparolas prof. d-ro Otto Haszpra(Hungario)

La vivo kaj la faroj de la granda filo de la bulgara popolo Georgi Dimitrov estas neelĉerpebla trezorejo de ideoj, spertoj, saĝeco kaj inspiro por ĉiuj progresemaj homoj en la tuta mondo. La faro kaj la ekzemplo de G. Dimitrov, kiu estis interalie bona amiko de Esperanto, havas apartan signifon por la tutmonda esperantistaro. Lia agado de arda pacbatalanto kaj internaciisto multrilate koincidas kun la noblaj streboj de la esperantistoj al mondo sen militoj, al amikeco kaj interkomprenigo de la popoloj, sendepende de la sociaj sistemoj de ties ŝtatoj. Ĝuste pro tio la 100-a datreveno de la naskiĝo de G. Dimitrov estis bona okazo por la organizo de scienca-praktika konferenco pri Georgi Dimitrov fare de CE de BEA.

La konferenco okazis je la 5-a kaj 6-a de junio 1982 kun la partopreno de ĉirkaŭ 150 esperantistoj-reprezentantoj de la E-societoj el la tuta lando, samkiel reprezentantoj de la esperantistaj asocioj de Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario kaj Pollando. Ĝi pasis en tri lokoj, intime ligitaj kun la vivo kaj la batalo de G. Dimitrov : Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov" en Sofio, urbo Pernik kaj vilaĝo Kovaĉevci, la naskiĝloko de G. Dimitrov. Ĝia moto estis la eldiraĵo de G. Dimitrov, entenanta pritakson pri la agado de la bulgaraj esperantistoj : *„Via agado per Esperanto estas valora, vi devas daŭrigi ĝin"*.

La konferencon malfermis la prezidanto de CE de BEA Ĥristo Gorov, kiu bonvenigis la reprezentantojn el la frataj socialismaj landoj : Jaroslav Klement (Ĉeĥa Esperanto-Asocio), prof. Jurgen Hamman (Centra Esperanto Laborrondo ĉe la Kulturligo de GDR), prof. Otto Haszpra (Hungara Esperanto Asocio) kaj Walter Zelazny (Pollando). Pro subita malsaniĝo la reprezentanto de la Asocio de Sovetaj Esperantisoj V. Kameŝkov ne povis veni.

En sia parolado Ĥristo Gorov substrekis, ke ankaŭ hodiaŭ la ideoj de G. Dimitrov estas aktualaj, ke lia nomo estas simbolo de la liberigaj movadoj, ke Dimitrov estas inspiranto de nia popolo en la konstruado de la matura socialismo.

Dum la konferenco estis faritaj 10 prelegoj — ĉiuj, escepte de unu, en Esperanto.

La unua tago de la konferenco pasis en la salono de la Nacia Muzeo „G. Dimitrov".

Unue Kunĉo Valev, ĝenerala sekretario de BEA, tralegis en esperanta traduko la alparolon de la direktorino de la Nacia Muzeo „Georgi Dimitrov" Ĉervendineva, en kiu ŝi rakontas pri la historio kaj la agado de la Muzeo.

La vicprezidanto de la CE de BEA Petar Todorov tralegis la raporton de Nikola Aleksiev, heroo de la socialisma laboro kaj honora prezidanto de MEM, kiu forestis el la lando. La temo de lia prelego estis „Konciza biografia skizo pri Georgi Dimitrov".

Pro foresto el la lando Kunĉo Valev tralegis la tre interesajn rememorojn pri G. Dimitrov de Asen Grigorov, elstara veterano de la bulgara esperantista movado kaj la unua persona sekretario de G. Dimitrov post ties reveno en Bulgarion en 1946.

Prof. Otto Haszpra salutis la konferencon je la nomo de HEA. Estis voĉlegita la salutletero de la jugoslava esperantisto s-ano Đurdević.

„Georgi Dimitrov kaj Klement Gottwald — kunbatalantoj en la III-a Komunista Internacio" estis la temo de la prelego de Jaroslav Klement.

Al la grandega kontribuo de G. Dimitrov por la organizado de forta partizana movado en Bulgario estis dediĉita la prelego de Ĥristo Gorov, eksa partizano.

Pri la literaturo pri Georgi Dimitrov en Esperanto prelegis Kunĉo Valev.

La lasta preleginto estis la juna ĵurnalistino kaj redaktorino de „Bulgara Esperantisto" Maria Jankova pri temo „La proletaj esperantistoj en Bulgario defende al Georgi Dimitrov".

Post la prelegoj la konferencanoj spektis du dokumentajn filmojn — pri la Lejpciga proceso kaj pri la patrino de G. Dimitrov avino Paraŝkeva kaj trarigardis la domon-muzeon „G. Dimitrov".

La sekvan tagon antaŭtagmeze la konferenco daŭrigis sian laboron en Pernik — la urbo, kiu estis ligita kun la agado de G. Dimitrov kiel sindikata aganto kaj organizanto de la bataloj de la Pernik-ministoj.

En la salono de la Distrikta Muzeo la prezidanto de CE de BEA Ĥ. Gorov bonvenigis Ivan Dreĥarski, estron de la fako „Propagando kaj Agitado" ĉe la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj Zdravko Ĥristov, sekretarion de la Komunuma Komitato de BKP en Pernik.

Ivan Dreĥarski faris prelegon bulgarlingve pri la temo „Georgi Dimitrov kaj la ministoj de Pernik".

La prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato Dimitar Ĥaĝiev prelegis pri la testamentoj de G. Dimitrov al la esperantistoj-pacbatalantoj.

Interesa estis la mallonga prelego de Ŝterju Kukuŝev el urbo Peŝtera pri la defendo de G. Dimitrov dum la Lejpciga proceso fare de nederlandaj esperantistoj.

Posttagmeze la konferencanoj alveturis v. Kovaĉevci, kie ili vizitis la naskiĝdomon de G. Dimitrov kaj metis florkronon ĉe la monumento de G. Dimitrov. En la salono de la Domo-Monumento „Georgi Dimitrov" okazis la lasta kunsido de la konferenco. Prof. Jurgen Hamman — longjara administranto de la Muzeo „G. Dimitrov" en Lejpcigo, prelegis pri la agado de la muzeo, pri la movado de la produktadbrigadoj en GDR, portantaj la nomon de G. Dimitrov, pri la meritoj de Dimitrov al la germana laborista klaso kaj pri la kontribuo de Dimitrov por la kreado de GDR.

En siaj fermaj vortoj Ĥristo Gorov dankis la reprezentantojn de la frataj socialismaj landoj pro ilia partopreno, kiu donis al la konferenco vere internacian karakteron. Li faris altan pritakson pri la konferenco. La saman opinion esprimis ĉiuj konferencanoj.

DIMITAR ĤAĜIEV,
prezidanto de la MEM-Sekcio ĉe BEA

BULGARA ESPERANTISTO
ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 51
JULIO
7 • 1982

# IMPETE, AŬDACE, FIDELE!...



**La unua partia kaj ŝtata gvidanto Todor Ĵivkov interparolas kun junaj delegitoj**

*Finis sian laboron la XIV Kongreso de la Dimitrova Komunista Junulara Asocio (DKMS). Ĝi transformiĝis en centran soci-politikan eventon en la vivo de la bulgara junularo kaj de nia tuta socio. Tiu ĉi grava forumo estas ligita kun la 70-jariĝo de la organizita junulara movado en Bulgario kaj kun la 100-jara datreveno de Georgi Dimitrov — patrono de la organizaĵo.*

*Proksimume 2700 delegitoj, kiuj reprezentis 1,5 milionojn da membroj de la bulgara Komsomolo, dum tri tagoj pridiskutis la plej gravajn problemojn, kiuj emocias la junularon de Bulgario. Inter la delegitoj estis reprezentantoj de la laborista kaj kamparana junularo, junaj sciencistoj, kreantoj de arto kaj kulturo, sportistoj, mezlernejanoj kaj studentoj.*

*„Kiel memstara socipolitika amasorganizaĵo de la bulgara junularo hodiaŭ DKMS havas 1,5 milionojn da membroj — tio estas gejunuloj, kiuj daŭrigas la tradiciojn de nia revolucia junulara movado" — deklaris en sia raporto antaŭ la Kongreso de la Komsomolo la unua sekretario de ĝia Centra Komitato Stanka Ŝopova.*

*Nun la gejunuloj prezentas 60% el la specialistoj kaj laboristoj kun alta klereco, pli alta faka aŭ profesia instruado. La partopreno de la Komsomolo en la socia gvidado fariĝas ĉiam pli ampleksa, estas dirite en la raporto. Nuntempe 20% el la deputitoj en la Popolaj Sovetoj estas personoj je aĝo ĝis 30 jaroj. Nur en la Parlamento, la plej supera organo de la ŝtatpovo, estas 33 junaj popolaj reprezentantoj.*

*La raportanto tuŝis ankaŭ la partoprenon de la bulgara Komsomolo en la plenumo de la decidoj de la XII kongreso de BKP kaj deklaris, ke la juna generacio energie laboras por konstruado de la materiala-teknika bazo de la evoluinta socialismo, apogante sin sur la avangardaj konoj de la scienc-teknika progreso.*

*La Dimitrova Komsomolo aktive subtenas la*

*unuecon de l' internacia progresema kaj demokrata junulara movado, ĝian kontribuon al la batalo por paco, malarmado kaj malstreĉiĝo, por pli bona estonteco de la popoloj.*

*Delegito de la XIV Kongreso estis ankaŭ la ĝenerala sekretario de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario Todor Ĵivkov. Li turnis sin al la Kongreso, al la tuta bulgara junularo per brila kaj emocia parolado. Ĝi estis nova sincera dialogo kun la junaj homoj.*

*La novelektita Centra Komitato de la Dimitrova Komsomolo unuanime reelektis k-dinon Stanka Ŝopova kiel unuan sekretarion de CK de DKMS.*

*La junulara E-movado en Bulgario, konstante helpata materiale kaj morale de DKMŜ, evoluas kaj atingas novajn sukcesojn. Tial kune kun la tuta bulgara junularo, ankaŭ ni, la junaj esperantistoj kun ĝojo renkontas la decidojn de la XIV Kongreso de la Dimitrova Komsomolo. Ni aktive partoprenos en la plenumado de la historia tasko de nia generacio — la konstruado de la materiala kaj spirita kulturo, formiĝo de la personeco kaj kreo de la matura socialisma socio. La reala socialismo ebligas al ĉiu junulo kaj junulino trovi sian lokon en la vivo kaj evoluigi siajn kapablojn kaj konojn.*

**EVGENI GEORGIEV,**
**estrarano de BEJ ĉe BEA**

---

## LA CENTRA ESTRARO DE BEA PLENKUNSIDIS

Jam finiĝis ankoraŭ unu lernojaro, komenciĝas ferioj dum la someraj monatoj; venas tempo por vigla instruado kaj preparo de rajtohavaj instruistoj por la novaj fakultativaj kursoj en la naŭaj kaj dekaj klasoj de la mezlernejoj en nia lando; venas tempo por aktiva vojaĝado tra la lando kaj eksterlanden, de renkontiĝoj kun esperantistoj el diversaj landoj. . . Lige kun tio, la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio okazigis je la 25-a de majo j. k. en Sofio plenkunsidon, en kiu la aktivularo de BEA pridiskutis gravajn problemojn de la propaganda, instru-metodika kaj organiza laboro de la asocio ĝis la fino de la kuranta jaro, kiuj desegnis la perspektivojn por nia plua aktivado.

Kun granda intereso la partoprenantoj en la plenkunsido aŭskultis la prelegon de Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, pri la taskoj de la bulgaraj esperantistoj konekse kun la propagando de la atingoj de nia popolo en la konstruado de la socialisma socio kaj pri ilia konduto dum renkontoj kun alilandaj esperantistoj; pri kompetenta klarigo al eksterlandanoj de la pacama politiko de nia ŝtato kaj de la batalo por paco, kiun vigle partoprenas nia popolo. Multaj ĉeestantoj dividis sian sperton kaj rakontis pri siaj kontaktoj kaj korespondado kun alilandaj esperantistoj.

La organiza sekretario de BEA Dimitar Papazov raportis pri la rezultoj de la jam finiĝinta raport-elekta kampanjo de la asocio, kiun li pritaksis kiel rezultodona kaj kuraĝiga. Li substrekis la gravan fakton de juniĝo de la distriktaj estraroj de BEA kaj de la membroj de la E-organizaĵoj ĝenerale. Papazov rekomendis iujn celkonformajn metodojn kaj formojn de organiza laboro celantajn ĝian plibonigon.

Pri la rezultoj de la ĵus finiĝinta lernojaro kaj de la instru-metodika laboro de BEA parolis la ĝenerala sekretario de la asocio Kunĉo Valev. Li sciigis al la ĉeestantoj la ĝojigan novajon, ke la Ministerio de Popola Klerigado enkondukos Esperanton kiel fakultativan lernobjekton ankaŭ en la dekajn klasojn de la ĉiuspecaj mezlernejoj ekde la lernojaro 1982—1983. Tiu ĉi grava kaj ĝojiga fakto estas alta atesto pri la nobla kaj utila agado de BEA, sed samtempe ĝi plialtigas la postulojn al ĉiu bulgara esperantisto. Tio speciale rilatas al tiuj, kiuj havas la respondecan taskon instrui Esperanton, prepari novajn kadrojn de spertaj E-instruistoj kaj altiri al niaj vicoj novajn esperantistojn. K. Valev parolis ankaŭ pri la instru-metodika laboro, pri organizado de E-kursoj kaj pri aplikado de modernaj instru-rimedoj laŭ la jam starigita praktiko de la instruistoj de fremdaj lingvoj en la mezlernejoj, kio plialtigos la nivelon de la instrulaboro. Li speciale emfazis la neceson serĉi variajn, interesajn formojn de instrua kaj organiza laboro kun la gelernantoj por altiri ilin al niaj E-kursoj kaj reteni ilin kiel novajn, aktivajn membrojn de nia asocio, de nia E-movado.

La prezidanto de BEA Ĥristo Gorov raportis pri la financa stato de la asocio en 1981 kaj 1982 jaroj kaj substrekis la zorgojn de la Bulgara Komunista Partio kaj de la popola registaro pri nia movado, pro kio la bulgaraj esperantistoj esprimas sian profundan dankon.

**D. S. Ĥ.**

# TAGOJ DE LA E-KULTURO „SOFIO' 82"



Partoprenintoj en la Tagoj de la E-kulturo „Sofio' 82"

Jes, esperanta kulturo ekzistas! Ni, esperantistoj, bone scias, ke ĝi ekzistas, ĉar niaj kontaktoj kun ĝi estas ĉiutagaj — tio ĉi estas niaj renkontiĝoj kun la originala kaj traduka E-prozo, poezio kaj ĵurnalistiko, E-kantoj, E-teatro. . .

La temo pri la esperanta kulturo altiris en la komenco de junio la atenton tiel de ĵurnalistoj, kiel ankaŭ de la publiko en la ĉefurbo. La centra gazetaro donis lokon sur siaj paĝoj al unua en sia speco en Bulgario E-iniciativo. La homoj misinformitaj rilate la Internacian Lingvon, kiuj ĉeestis la Tagojn de la E-kulturo „Sofio-82 konfesis, ke la verko de Zamenhof estas vivanta lingvo — parolata kaj belsona. Multaj skeptikuloj konvinkiĝis, ke per Esperanto oni ne nur povas, sed efektive kreas kulturajn valorajojn.

La Tagoj de la E-kulturo (5—9 de junio 1982) distingiĝis ne nur per la varieco de la programo, konsistanta el naŭ iniciatoj, sed ankaŭ per la amasa partopreno de esperantistoj el la tuta lando—1102 personoj, 77 el ili estis interpretantoj de literaturaj-muzikaj programeroj. La eldiroj de sur la tribuno de la scienc-praktika konferenco, la kantoj kaj versoj, kiuj sonis de sur la scenejaj podioj, la entuziasmaj paroloj dum la ekskursoj estis dediĉitaj al la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov kaj al la 75-jara jubileo de BEA.

La tagoj de la E-kulturo „Sofio' 82" estas jam historio, tial la organizantoj — la Sofia UE de BEA kaj la Sofia E-Kulturcentro „Maksim Gorki" — jam analizas sian laboron. La bilanco de la sukcesoj kaj mankoj estas garantio, ke tiu ĉi unua manifestaĵo estiĝos ĉiujara tradicio.

Kion povis vidi kaj aŭdi la gastoj dum la kvin tagoj, dediĉitaj al la E-kulturo?

## SOLENA KONCERTO

La publiko estas staranta. Sonas „La Espero" — la esperanta himno en plenumo de la Sofia E-ĥoro sub la direktado de Dimitar Terziev. Unuan fojon en la Popola Palaco de Kulturo „Sofio" sonas la vortoj de Zamenhof por heroldi la komencon de la Tagoj de E-kulturo „Sofio'82". Tiun ĉi gravegan manifestaĵon de la sofiaj esperantistoj per mallonga salutparolado malfermis la ĝenerala sekretario de la CE de BEA Kunĉo Valev.

En daŭro de du horoj kun versoj kaj muziko pasis la solena koncerto. Kompreneble, la Dimitrov-temo estis ĉefa temo, precipe en la interpretoj de la recitantoj. Interesa estis la komponaĵo de la recitalo „La Senmorta", plenumita de membroj de klubo „Juna Esperantisto" ĉe SEKC „Maksim Gorki" sub la gvidado de Stefka Kalimenova.

Ljubomira Velkova verve deklamis versaĵon pri Georgi Dimitrov, verkitan en Espe-

ranto de Dimitar Denĉev. Emociite de la bonega plenumo de „Blankas soleca velo" — la ŝatata kanto de Georgi Dimitrov, la publiko ekkantis la melodion kune kun la ĥoro. Krom la bonega interpretado, la ĥoro faris agrablan impreson dank' al sia repertuaro. La temo pri Bulgario ĉeestis en la plenumo de la laŭreatino de la Internacia Konkurso-Recitalo de Botev-poezio Ĵorĵeta Zdraveva. Ŝi prezentis la kompozicion „Bulgario" laŭ versoj de la E-poetino Ljuba Bojaĝieva. Angelina Sotirova plenumis „Poemon pri Bulgario" de Dimitar Metodiev.

La publiko akceptis kun intereso „Barkarolo" el „Hoffmann-fabeloj" de Offenbach, plenumitan de Maria Angelova, la arion de Zornica el la opero „Lud Gidia" (Arda junulo) de Paraŝkev Haĝiev, plenumitan de Karanfilka Adamova kaj ankaŭ la bonan prezentiĝon de la juna operkantistino Radka Malamova. Tondraj aplaŭdoj plenigis la halon post la plenumo de la serenado de Mefistofelo el la opero „Faŭsto" de Gounod, majstre interpretita de la merita artisto Veselin Damjanov.

Kun ekkrioj „Brave!" kaj „Bis!" la publiko aplaŭdis Maria Angelova kaj la meritan artiston Veselin Damjanov por la dueto el la opero „La Sorĉa Fluto" de Mozart.



Florkronoj al Dimitrov antaŭ la Domo-monumento en v. Kovaĉevci

## LA DIMITROV-SANKTEJOJ EN PERNIK KAJ KOVAĈEVCI

La distrikto de Pernik estas unu el la plej evoluintaj industriaj regionoj de nova Bulgario — granda centro de la peza industrio. La urbo de la nigra oro — la distrikta urbo Pernik, gastame bonvenigis la partoprenantojn en la E-Tagoj. La esperantistoj vizitis la novan Memorigan Komplekson „Georgi Dimitrov kaj la bataloj de la ministoj el Pernik", situantan sur areo de 950 kvadrataj metroj. La projekto de la monumento estas faro de krea kolektivo kun gvidanto la merita pentristo prof. Sekul Krumov. Ĉiu el la naŭ komponajoj de la memorkomplekso konsistas el 23 figuroj, respegulantaj la pezan vivon de la ministoj en Pernik antaŭ la Naŭa de Septembro 1944, iliajn klasbatalojn kaj la elkreskon de Georgi Dimitrov kiel gvidanto de la proletaro en Bulgario. La monumento-simbolo de la danko de la novaj generacioj, estas ellaborita el nigra marmoro kiel sugesto pri la peza laboro de la ministoj. Impresas la dimensioj de la bronza figuro de Georgi Dimitrov, situanta ĉe la enirejo de la memorkomplekso — ĝi estas ok metrojn alta.

La dua haltejo de la esperantistoj dum ilia vojaĝo tra la Dimitrov-lokoj estis vilaĝo Kovaĉevci en la distrikto de Pernik. En la antaŭjubileaj tagoj ĉi tien ĉiutage venas pli ol ses mil personoj el ĉiuj regionoj de la lando por viziti la naskiĝdomon de Georgi Dimitrov. En la vilaĝo estas konstruita Domo-monumento „Georgi Dimitrov", en kiu estas ekspoziciitaj materialoj pri la vivo de la herco el Lejpcigo, pri lia agado kiel gvidanto de la klasbataloj de la ministoj el Pernik. ... La partoprenantoj en la Tagoj ankoraŭfoje esprimis sian adoron antaŭ la revolucia faro de la gvidanto kaj instruanto de la bulgara popolo, prezentante florkronon antaŭ la monumento de Dimitrov en Kovaĉevci.

## LITERATURA E-VESPERO

„La ekskurso" tra Sofio eble estis laciga, ĉar unu mateno ne sufiĉas por viziti ĉiujn historiajn vidindaĵojn de la ĉefurbo. Sed tio ĉi ne malhelpas la partoprenantojn en la literaturaj legadoj, dediĉitaj al Georgi Dimtrov senti animan ĝojon pro la kontakto kun la originala E-prozo kaj poezio. Kun intereso la publiko akceptis la verkojn de Asen Grigorov, Ljuba Bojaĝieva, Mihail Ĉobanov, Ŝtefan Sokolov, Rajna Konstantinova, Penka Batoeva, Nevena Nedelĉeva, Stamenka Dimitrova, (Botevgrad), Penka Papazova (Jambol),

Mihail Zdravev, Rajna Agonceva (Pernik), Antoaneta Atanasova. Multaj el la menciitaj aŭtoroj estas multjaraj membroj de la Sofia Literatura E-Rondo, fondita antaŭ 20 jaroj de Asen Grigorov. Ne unufoje ĝiaj membroj gajnis internaciajn premiojn. Ne unufoje helpis per konsiloj la E-poetojn kaj verkistojn ankaŭ la neforgesebla Atanas D. Atanasov (ADA).

### EKSKURSO AL MONTODOMO „ESPERANTO"

Aero kaj verdaĵo. Ĝojo pro la kontakto kun la naturo. Amuzo inter amikoj. Tiel plej koncize oni povus rakonti pri la ekskurso al Vitoŝa-monto. En montodomo „Esperanto" krom la literatura-muzika programo, la ekskursantoj aŭdis ankaŭ rememorojn pri G. Dimitrov de Asen Grigorov.

### SCIENC-PRAKTIKA KONFERENCO „75 JAROJ BEA"

Unu el la plej gravaj eventoj dum la Tagoj de E-kulturo estis la Scienc-Praktika Konferenco, dediĉita al la 75-jara datreveno de BEA. La raporto de Krastju Karucin estis dediĉita al la historio de la Sofia E-movado. Kunraportojn pri la temo prezentis la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev, kiu rakontis siajn rememorojn pri la laborista E-movado en Sofio (1928-1934) kaj Ivan Keremidĉiev — pri la E-movado en la ĉefurbo dum la periodo 1936—1944. Mihail Zdravev tralegis rememorojn de akad. Todor Pavlov pri la lernado de Esperanto en la Sofia Centra Malliberejo. Rajna Konstantinova verve parolis pri la kontribuo de Atanas D. Atanasov (ADA) por la elkresko de la E-movado en Sofio. En siaj rememoroj prof. d-ro Stojan Guĝev ankaŭ parolis pri la E-movado en Sofio antaŭ la 9-a de septembro 1944.

La kunraporto de Kosta Georgiev estis dediĉita al la plej gravaj momentoj el la historio de la Sofia fervojista E-societo kaj Todor Ŝoŝev parolis pri la agado de la E-Societo de Blinduloj en Sofio.

Kunĉo Valev verve parolis pri eminentaj agantoj de la ĉefurba E-movado.

La partoprenantoj en la Tagoj de la E-kulturo havis eblecon trarigardi ankaŭ la ekspozicion „Georgi Dimitrov kaj la mondo", en kiu gaste partoprenis kun materialoj kolektitaj per korespondado kun alilandaj esperantistoj la E-societoj el Polski Trambeŝ, Galabovo kaj Peŝtera.

La Tagoj de la Esperanta Kulturo estis fermitaj per solena koncerto.

**Maria JANKOVA**

---

## LA INTERNACIA LINGVO KAJ LA BULGARAJ SCIENCISTOJ

La 23-an kaj 24-an de aprilo j.k. en Sofio okazigis sian III (XII) kongreson la Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario (ASLB). Kiel reprezentantoj de la 61 055 membroj de la Asocio en la kongreso partoprenis pli ol 600 delegitoj kaj kelkaj fremdlandaj sciencistoj.

Fondita post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario (9. IX. 1944) nun ASLB unuigas 17 specialigitajn fakajn sekciojn kun 3729 individuaj membroj kaj 15 distriktajn filiojn kun 2120 membroj. Krom tio en la Asocio partoprenas kiel aktivaj membroj 67 sciencaj societoj kaj unuiĝoj kun 55 209 membroj.

ASLB estas membro de la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj (MFSL), fondita antaŭ 35 jaroj laŭ iniciativo de la famaj sciencistoj Joliot-Cure kaj prof. John Bernal. Ĝia longjara vicprezidanto estas la prezidanto de ASLB akademiano prof. Kiril Bratanov, kiu estas bona amiko de Esperanto.

En MFSL estas unuiĝintaj pli ol 1 450 000 sciencaj laboristoj el 57 landoj. Ĝia oficiala presorgano estas revuo SCIENCA MONDO, eldonata en angla (en Britlando), en germana (en GDR), en rusa (en Sovetunio) lingvoj. De 1976 tiu ĉi organo estas eldonata en Bulgario pere de ASLB ankaŭ en Esperanto. Redaktoro de la esperanta versio estas la merita aganto de stekniko kaj popola aganto de la scienco prof. inĝ. Vasil Peevski.

Dum la kongreso Esperanto estis menciita kelkfoje:

1. En la ĝeneralaj presitaj informoj pri la organizacio kaj la agado de ASLB.

2. En la rezolucio de la kongreso, en kiu la lasta rekomendas al la Prezidantaro de la Asocio pritrakti la pluan eldonadon esperantlingve de „SCIENCA MONDO", en kiu oni publikigu pli da materialoj el la scienca vivo en Bulgario.

3. La kongreso decidis, ke ĝia unuanime akceptita deklaracio kontraŭ la nuklea, kemia kaj bakteriologia armado, por malpermeso de la milito kaj por politika kaj milita sereniĝo estu eldonota krom en la grandaj naciaj lingvoj ankaŭ Esperante kaj estu dissendita al la gravaj internaciaj oficialaj instancoj, samkiel al diversaj neoficialaj organizaĵoj, eminentuloj k. a.

Tiu ĉi favora rilato de la bulgaraj sciencistoj estas tre grava rekono de la Internacia Lingvo. Ĝi ebligas ne nur al la bulgaroj, sed ankaŭ al la eksterlandaj esperantistaj organizaĵoj kaj apartaj esperantistoj subteni per abono la pluan eldonadon de revuo „SCIENCA MONDO", kies enhavo estas scienc-populara kaj pacama kaj la abonprezo estas tre malalta.

**Prof. d-ro Mihail D. POPOV**

# DIMITROV KAJ GERMANIO



Parolas Georgi Dimitrov

Okaze de la 100-jara datreveno de Dimitrov ni pritraktu lian historian ligitecon kun Germanio.

Jam en la jaro 1921, survoje de Moskvo al sia patrolando, dum restado en Berlino Dimitrov publikigis la tiel nomitajn leterojn el Germanio, per kiuj li konigis al la bulgara popolo la ekonomian kaj politikan situacion de Germanio.

Ekde 1927 li devis labori sub fremdaj nomoj. En la dua eksterleĝa partia konferenco en Berlino li faris raportojn. Ekde 1929 sidejo de la organoj de Bulgara Komunista Partio kaj Balkana Komunista Federacio, kies membro estis Dimitrov, fariĝis Berlino. Tie ĉi li agadis kiel observanto kaj transprenis la gvidadon de la Okcidenteŭropa Buroo de la Kominterno.

Survoje de Munkeno al Berlino li eksciis, ke la Parlamentejo estis incendiita. Oni kulpigis la komunistojn. Je la 9-a de marto Dimitrov, Popov kaj Tanev estis arestitaj de la germana polico. Dimitrov klarigis, ke la incendio de la Parlamentejo ne estas ligita kun kiu ajn ago de la germana komunista partio. Sed la dokumentoj de la proceso titolita „Proceso de Van der Lubbe kaj kunkulpuloj" estis donitaj al la Punsenato de l'Imperia Tribunalo en Lejpcigo.

La proceso komenciĝis je la 21-a de septembro 1933.

Sur la benko de la akuzitoj sidas la tri supre menciitaj bulgaraj revoluciuloj, la nederlandano Marinius van der Lubbe kaj Torgler, la prezidanto de la komunista frakcio de la Parlamento. Je la tria tago de la proceso la tribunalprezidanto d-ro Bünger komencas la juĝesploron de Dimitrov. Dum tri monatoj Dimitrov elŝiras dank' al sia supereco la gvidadon de la proceso pli kaj pli el la manoj de la juĝistoj kaj fariĝas akuzanto. Je la 4-a de novembro 1933 aperas Göring kiel atestanto. Li minacas la heroon de Lejpcigo per mortigo. Sed faŝisma Germanio estis devigita liberigi Georgi Dimitrov, kiu la 27-an de februaro 1934 paŝas sur soveta teritorio.

Liaj adiaŭaj vortoj estis: „Mi estos feliĉa daŭrigi la batalon en la medio de mia propra popolo".

**OSKAR STOLBERG, GDR**
**(Laŭ dokumentoj de la Dimitrov-muzeo en Leipzig, GDR)**

# EN KARTVELIO

Post la Lejpciga Proceso 1933, malgraŭ la senkulpiga verdikto, Georgi Dimitrov restis en la malliberejo Moabit en faŝista kaptiteco. Oni volis likvidi lin. Tiam la registaro de Sovet-Unio donas al li sovetan civitanecon kaj li forveturas al Moskvo.

La tempo pasigita en la malliberejo ŝanĉelas lian sanstaton. La soveta registaro lin sendas al Borĵomi, unu el la famekonataj kaŭkazaj kuraclokoj, por restarigi sian sanon.

Mi delonge korespondas kun kamaradino Kristina Kaĝaja, gvidantino de internacia Esperanto-rondeto en la kartvela urbo Kutaisi. Unu el la temoj, kiujn ni tuŝas en niaj leteroj, estas ankaŭ la temo pri Georgi Dimitrov (ŝi scias, ke en 1945—1946 mi estis persona sekretario de la mondfama bulgaro), kaj ŝi sendas al mi materialojn por la tempo (1934), kiam li ripozas en Borĵomi, Kartvelio.

En la sanatorio, kie Georgi Dimitrov ripozas, li estas atente prizorgata de la kuracanta personaro. Li fariĝas centro de atento de ĉiuj ripozantoj. Dimitrov ravas ilin per sia simpla sinteno, per la amo al la sovetianoj, per sia ĉarma homeca karaktero. Li rakontas al ili pri sia sunplena Bulgario, pri ĝiaj na-

turbelaĵoj, pri ĝiaj montaroj, pri Balkan-Montaro, Rila, Pirin, Vitoŝa, kiuj similas al la Kaŭkazaj montaroj.

Post la monatoj de streĉo kaj suferoj travivitaj de li en la malliberejo de la faŝista bestio, ligite per mankatenoj, izolite disde la ekstera mondo, elmetite al fizika kaj morala premo, li nun ne povas ĝissate ĝui la lazuran kaŭkazan ĉielon, la bonegajn sovetajn homojn.

Dimitrov ofte promenas tra la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Borjomi, en la proksimaj arbaroj. Foje li vidis en la arbaro kelkajn knabojn kaptantajn birdojn. En ilia kaĝo jam baraktis, provante elflugi, kaptitaj kardeloj kaj paruoj.

— Kion vi faros pri ili? — Dimitrov haltigis la bubojn.

— Ni vendos ilin — respondas la knabo kun kaĝo.

La knabo diras la monsumon.

— Bone, mi aĉetos ilin, jen estas la mono. Kaj nun — lasu ilin liberaj!

La buboj mire rigardas lin kaj ne komprenas:

— Ja, kiel tiele?. . . Kial? Vi ja ilin aĉetis?

Tiam li diris al ili:

— La arbaro estas bela kun tiuj birdetoj, kun iliaj melodiaj kantoj. Por ili la kaĝo estas malliberejo. Imagu, ke vi estas en ilia situacio: malica homo vin kaptas kaj malliberigas. Vane via patrino ploros kaj veos, ĉar ŝi neniam plu vin revidos.

La knaboj malfermas la kaĝon kaj la buntaj flugilhavaj kaptitoj jubile elflugas en la aeron.

La etaj birdkaptistoj estiĝis protektantoj de la viva naturo. Ili ne nur ĉesis ĉasi birdojn, sed eĉ fariĝis iliaj amikoj. Ili elfaris lignodometojn por birdoj kaj ilin fiksis sur arbojn, kolektis por ili panerojn kaj grenetojn, protektis ilin.

Proksimiĝis la fino de la ripozo. La novaj amikoj de Dimitrov komencas flustri inter si: per kia donaco surprizi la gloran bulgaron. Post kelke da tagoj du ĉasistoj alportas al la sanatorio etan cervidon. Ili solene prezentas la donacon. Dimitrov dankas el la tuta koro kaj tamen petas, ke la cervido estu reportita al la arbaro. Kaj la cervido mem, pri kiu li tenere zorgas, alkutimiĝas al li, sekvas lin ĉie: kie li, tie ankaŭ ĝi. Ĝi sentas la amon de sia protektanto.

— Ni remetos ĝin sur la saman lokon, de kie ni ĝin prenis — la ĉasistoj proponas.

Sed Dimitrov konsilas al ili:

— Prefere lasu ĝin fortikiĝi, kreski pli granda, lerni trovi al si nutraĵon, kuri rapide, sin gardi kontraŭ malamikoj, elserĉi la siajn. Alie ĝi pereos, sovaĝaj bestoj povus ĝin disŝiri.

Oni tiel decidas.

Kaj la amikoj el la sanatorio ĝis la fino de la vivo ne forgesas sian humanan amindan bulgaran amikon, firman batalanton por justeco kaj libero, tenere amantan homojn kaj naturon, fidelan filon de sia popolo, de sia belega lazurĉiela Bulgario. La kartvelaj kamaradoj skribas rememorojn pri li en ĵurnalo „Kutaisi“ en kartvela lingvo, kiun mi ne komprenas. Sed por mi tio ne estas problemo: Kristina tradukis en Esperanton la kartvelajn tekstojn.

1982 **ASEN GRIGOROV**

**Glosoj:**
**Bestio — rabobesto**
**Tenera — milda, delikatkora**

# VOĈO POR PACO KAJ MALARMADO

**La 2-an de julio j. k., en UNO, kie kunsidis la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Kunveno de UNO pri la malarmado, okazis ceremonio, dum kiu la prezidanto de la Bulgara Societo pri UNO Krum Ĥristov prezentis Alvokon por Paco kaj Malarmado kun la subskriboj de pli ol 103 000 niaj samnacianoj, kolektitaj laŭ iniciato de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Bulgara Komitato de la Tutmonda E-movado por Paco.**

**Akceptante la Alvokon, la vic-ĝenerala sekretario de UNO kaj direktoro de la Centro de UNO pri Malarmado Jan MARTENSON substrekis la signifon de la publika agado por paco kontraŭ la armado. „Tio ĉi estas aparte grava, — li diris, — ĉar nur unu atombombo povas neniigi 7 milionojn da homoj, kaj nun en la mondo estas amasigitaj pli ol 50 000 similaj bomboj“.**

**Martenson substrekis la „alligitecon al la paco, kunlaborado kaj sereniĝo, kiun Bulgario kaj la bulgara registaro pruvas per sia kontribuo al la laboro de UNO“.**

**Prezentante la Alvokon kun la subskriboj, Krum Ĥristov emfazis, ke ilia spontana kolektado fare de la E-societoj estas simbola. Bulgario kaj la bulgara popolo, deklaris Krum Ĥristov, rigardas kun espero al la nuna sesio kaj kredas, ke ĝia laboro estos grava kontribuo al la afero de la paco kaj malarmado — la alta celo, por kiu donis siajn subskribojn sub la Alvoko pli ol 100 000 bulgaraj esperantistoj kaj bulgaraj civitanoj.**

**Ĉio-ĉi estas grava rekono pri la penoj kaj la nobla agado de la bulgaraj esperantistoj — fidelaj internaciistoj kaj pacbatalantoj.**



# VASIL BOZAROV NE PLU ESTAS INTER NI...

**La 2-an de junio j. k. subite forpasis la aktiva ba talanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, la heroo de socialisma laboro, la popola instruisto VASIL BOZAROV.**

**Nia Esperanto-movado perdis unu el siaj elstaraj veteranoj, kies meritoj pri la disvastigo de la Internacia Lingvo en nia lando kaj speciale pri ĝia enkonduko en la lernejojn estas ege grandaj.**

**Vasil Bozarov naskiĝis la 11-an de novembro 1907 en vilaĝo Pravec, distrikto de Sofio, en multnombra laborula familio. Jam dum siaj lernejanaj jaroj li aktive partoprenas la soci-politikan vivon kaj samtempe lernas Esperanton. Kiel studento pri biologio en la Sofia Universitato, Vasil Bozarov estas en la unuaj vicoj de la studentaj demonstracioj por demokratiigo de la studado kaj kontraŭ la faŝisma reĝimo.**

**Post la venko de la socialisma revolucio Bozarov dediĉas siajn fortojn kaj sperton al la konstruado de la nova socio kaj de la nova instru-kleriga sistemo en nia lando.**

**Multjara instruisto, direktoro de gimnazio, vicdirektoro de la Sciencesplora Instituto pri Klerigo „T. Samodumov", ĉefredaktoro de la scienca revuo „Biologio kaj Kemio", Vasil Bozarov neniam forgesis Esperanton. Ĝis sia lasta tago li estis inter ni kaj li mem multe kontribuis por la enkonduko de Esperanto ankaŭ en la dekajn klasojn de la mezlernejoj en la tuta lando.**

**La bulgaraj esperantistoj neniam forgesos sian fervoran samideanon, la ĝentilan, modestan kaj laboreman homon, kiu per sia propra ekzemplo estis modelo por la juna generacio.**

**Lige kun la 75-jariĝo de BEA, antaŭ nelonge Vasil Bozarov disponigis al la redakcio de „Bulgara Esperantisto" rememorojn pri sia E-aktivado kiel gimnaziano, kiujn ni publikigas ĉi-sube.**

* * *

En la lastaj monatoj de 1924 en la gimnazio en urbo Orĥanie (nun Botevgrad) oni anoncis kurson de Esperanto. Jam lernanto en VII, nun XI klaso de la pedagogia lernejo, mi estis unu el la fervoraj kursanoj de mia samvilaĝano — la advokato Vasil Topalski. Forte impresis min liaj rakontoj pri lia partopreno en la Internacia E-kongreso en Vieno, Aŭstrio, en la sama jaro.

Preskaŭ ĉiuj E-kursanoj estis ankaŭ membroj de la funkcianta dum pluraj jaroj Lernejana Neŭtrala Societo de Abstinenculoj „Saviĝo". Ĝiaj anoj estis progresemaj gefiloj de laboristoj kaj kamparanoj. Laŭ iniciato de la prezidanto Nikola Peev kaj ĝia sekretario Marin Nanov (ili ambaŭ estis esperantistoj) en la dua duono de la lernojaro 1924/1925 estis fondita esperantista sekcio ĉe la abstinencula societo sub la nomo „Verda Radio".

Ni komencis aktivan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. Mi havis korespondantojn el Estonio. Kaj dum la someraj ferioj ni skribis unu al la alia leterojn en Esperanto. Tiel — iom post iom — mi estiĝis arda esperantisto.

Dum la sekvanta lernojaro la nombro de la kursoj kaj de la kursanoj konsiderinde kreskis. Kursojn gvidis ankaŭ lernantoj pro nesufiĉo de spertaj kursgvidantoj. Nia esperantista sekcio ĉe la abstinencula societo plinombriĝis kaj apartiĝis kiel memstara lernejana E-societo „Verda Radio". La kurson gvidis Stefan Grozdanov, lernanto, kiun ni elektis kiel prezidanton de la novefondita E-societo. Mi estis ĝia sekretario.

En tiu periodo — post la aprilaj eventoj en 1925, elstaraj komunistoj, agraranoj kaj progresemaj senpartiuloj estis terore persekutataj fare de la faŝisma polico kaj malaperadis sen postsigno!. . . Ni la lernantoj-esperantistoj kaj abstinenculoj elmontris viglan intereson al la politikaj problemoj, al la bataloj de la laboruloj kontraŭ la sanga monarko-faŝisma diktaturo en nia lando. Por ni Esperanto estis ne nur internacia lingvo por interkomunikiĝado kun eksterlandanoj, sed ankaŭ rimedo por internacia solidareco kaj frateco de la laboruloj el la tuta mondo.

El la vicoj de niaj tiamaj lernejanaj E-societoj eliris multaj progresemaj popolaj instruistoj, gvidantoj de la eksterleĝaj Komunista Partio kaj Komsomolo, kuracistoj kaj aliaj elstaraj klerigaj kaj soci-politikaj agantoj kiel la jam forpasintaj: Valko Radinski, Marin Geŝkov, Todor Dokov, Pavel Bozarov, d-ro Anton Bozarov kaj ankoraŭ nun aktive laborantaj Todor Jivkov — ĝenerala sekretario de CK de BKP kaj prezidanto de la Ŝtata Soveto, Nikola Jančev, prof. d-ro Ivan Vasilev, Nikola Peev (konata sub la kromnomo „Foto Esperanto") kaj multaj aliaj aktivaj esperantistoj.

Nia societo estiĝis aktiva kunlaboranto de la Gelernanta Esperanto-Ligo (GEL) kaj de ĝia organo „Esperantista Junularo". Tiu ĉi revuo publikigis informojn pri la aktivado de nia societo. En ĝi aperis mia unua presita verko (en Esperanto), sub la pseŭdonomo „Vahaba".

Dum la printempaj ferioj — en majo 1926, mi partoprenis la Konferencon de GEL kiel delegito de nia societo. Ĝi okazis en urbo Veliko Tarnovo en la turista montodomo „Carevec". En la vagonaro mi interkonatiĝis kun la lernanto el Sofio Petar Dinekov (nun elstara akademiano), kiu tiam ankaŭ estis delegito de la konferenco.

Dum la kunsidoj impresis min la flua parolado de multaj el la ĉeestantaj lernantoj, precipe de la membroj de la Estraro, kies sidejo estis en urbo Varna: Miĥail Sekerĝiev kaj Anastas Kojumĝiev. Mi memoras, ke la reprezentanto de la Bulgara Esperantista Societo Panajot Kolev salutis la Konferencon en la nomo de BES.

En majo 1926 mi travivis gravan kaj ĝojigan eventon: en Orĥanie alvenis la elstara aganto de la internacia E-movado Ivan Krestanov, aŭtoro de vico da libroj en- kaj pri Esperanto. Li verve parolis en Esperanto antaŭ la membroj de niaj gimnaziaj E-societoj pri la rolo de la Internacia Lingvo kaj pri nia devo de esperantistoj por ĝia popularigo. Post aplaŭdo de la oratoro, ni faris komunan foton kune kun la direktoro de la gimnazio kaj nia unua lektoro de Esperanto V. Topalski.

Neforgeseblaj kaj karmemoraj tagoj de mia esperantista juneco!. . .

Esperanto restis mia kuniranto dum mia tuta konscia vivo!

---

# „Albatro" daŭrigas la pacbatalon"

La neŭtralaj esperantistoj kaj la komunistoj-esperantistoj en la Nigramara urbo Varna ne kapitulacis sub la faŝista diktaturo. Ili transformis sian societon „Albatro" en citadelon de porpaca agitado. En 1936 la kultura kaj porpaca agado tiom kreskis, ke ĝi bezonis konstantan memstaran klubejon. En aŭgusto samjara la societa estraro luis tian klubejon. La 16-an de aŭgusto okazis ties solena inaŭguro. Krom la lokaj esperantistoj partoprenis ankaŭ delegitoj de E-societoj el multaj urboj de nia lando. Venis saluttelegramoj el pluraj aliaj loĝlokoj.

Surprizo de la festo estis la partopreno de kamarado Rudolf Meyer el Hamburgo, Germanio. Per vervoplena salutparolado li esprimis sian grandan ĝojon pro la feliĉa okazo, ke li havas eblecon ĉeesti tiom solenan E-feston. La germana kamarado parolis en Esperanto kaj k-do Vitali Julzari interpretis en bulgaran lingvon, ĉar partoprenis la solenaĵon ankaŭ multaj neesperantistoj, kiuj scivolis vidi kaj aŭdi la gaston el Germanio, t. e. el lando, kie la E-movado estis jam malpermesita. La parolado de k-do R. Meyer forte impresis ilin per la klare sentebla tendenco kontraŭ la faŝismo kaj militarismo.

La konata bulgara E-poeto Dimitr Zlatarski — Miti, deklamis sian jus verkitan poemon „Albatro", kiu poste transformiĝis en himnon de la E-societo en Varna. Longe post la fino de la solenaĵo en la oreloj de la partoprenantoj agrable sonis unu el ties strofoj:

„Albatron" renkontis ŝaŭmanta kaos',
ĝin ondoj minacas engluti,
sed ĝi ne ektimas, sen halt', sen ripoz'
ĝin gvidas eterna sopiro —
antaŭen, antaŭen tra densa nebul',
post kiu lazurojn vidos okul' !

En la aŭtuno de la sama jaro la klubejo de „Albatro" similis al vera abelujo. Ĉiuvespere en ĝi kunvenis 60—70 esperantistoj, kiuj sentime manifestis sian firman volon labori por nia internacilingva movado.[3] Tamen al la intensa kaj fruktodona agado de la esperantistoj enviis barbarecaj malamikoj, kaj ili atencis kontraŭ la E-movado, ĵetinte bombon en la klubejon. La tiama gazetaro menciis la fakton.

Per eksplodigo de bombo en la malplena klubejo la faŝistoj el Varna celis forpeli la esperantistojn el ties klubejo. La tiutempa societa raportanto Zefiro (k-do Violin Oljanov) skribis al gazeto „Bulgara Esperantisto": „Tio ne timigis nian samideanaron. Ni daŭrigis nian laboron".

La eksplodigo de bombo en la E-klubejo en Varna ne pravigis la esperojn de la fanatikaj reakciuloj. Al la membraro de la E-societo „Albatro" aliĝadis sisteme novaj pacaj batalantoj, kiuj energie defendis ne nur Esperanton kaj la pacon, sed individue kaj kolektive ili devis ankaŭ kuraĝe frontadi kontraŭ la faŝisma invado sur la terenon de la esperantista movado.

Tio rabiigis la faŝistojn kaj la 8-an de decembro 1936 ili eksplodigis duan bombon en la jam famiĝinta „Albatro"-klubejo. La dua atenco okazis dum la nokto kaj ĝiaj aŭtoroj ankaŭ restis „nekonataj" kaj nepunitaj. Tiam k-do Zefiro verkis la poemon „La Senmorta Albatro". Jen estas ĝiaj finaj du strofoj:

> Ĝin ne timigas ŝtormoj
> rabio kaj obskur'!
> Tra ŝtonoj kaj tra dornoj
> progresas la kultur'.
>
> Konstante semas birdo sankta
> la lumon inter homaj gentoj
> kaj spite al la aro vanta
> ĝi vivos multe da jarcentoj!

Kune kun la poemo k-do Zefiro aperigis longan artikolon pri la agado de „Albatro", kiu komenciĝas per la frazoj: „Malgraŭ la multaj baroj kaj malfacilaĵoj, renkontataj sur ĉiu paŝo, la E-movado en nia urbo rapide progresas. La du bomboj eksplodigitaj dum la aŭtuno en nia klubejo, ne timigis la esperantistaron. Spite al la ĉiamaj minacoj de la konservativuloj kaj kontraŭuloj, niaj anoj daŭrigas sian regulan agadon.

Ĉi tie ni vidigas al la legantoj kaj per ili al la tutmonda esperantistaro nur mallongan epizodon el la batalo de la bulgaraj esperantistoj kontraŭ la faŝismo kaj militarismo, kontraŭ la maljustaj militoj, por paco kaj amikeco inter la popoloj, por socia progreso kaj hela perspektivo antaŭ ĉiu homo kaj nacio, antaŭ la tuta homaro. Ni batalis kaj ni batalas ankaŭ nun. Kaj nia batalo estas nek unuopa, nek izolita, ĉar ni apartenas al la verda regimento de la homara pacarmeo. Kune kun la ceteraj fortoj de la sociala progreso ni ne almozpetas kaj ne almozpetos pacon de la militinstigantoj, de la agresemuloj kaj imperiistoj, de la nunaj pretendantoj pri monda regado. Ni batalas por mobilizi kaj kunordigi ĉiujn vere demokratajn fortojn, por ke ni povu kontribui kiom eble plej multe al la certa kaj rapida bridigo de la novaj militemuloj.

**CANKO MURGIN**

Notoj: 1) „Paco", oficiala organo de MEM, jk. 28, n-ro 5, de sep.—okt. 1981, p. 12
2) „Bulgara Esperantisto", jk. 18, n-ro 1-2, de sept.—okt. 1936.
3) „Bulgara Esperantisto", jk. 18, n-ro 3—4, de nov.—dec. 1936.
4) „Bulgara Esperantisto", jk. 18, n-ro 5—6, de jan.—febr. 1937.

# Porpacaj voĉoj




## INTERNACIA REKONO POR BULGARA POLITIKA AFIŜO

**La afiŝo sub titolo „Ĉu la homo estas prudenta?", verkita de la juna bulgara pentristo Nikolaj Nikolov, gajnis la unuan premion en la Internacia Ekspozicio de Politikaj Afiŝoj en urbo Mons, Belgio.**

**Per tiu artverko la bulgara pentristo aligis sian proteston al tiu de la batalantoj el la tuta mondo kontraŭ la milito kaj la minaco de nuklea katastrofo.**

● ● ●

## AL LA GENERALOJ KAJ LA MINISTROJ DE NATO

**Pere de vi ni turnas nin al ĉiuj, kiuj havas profiton de la minaco neniigi la Teron per nuklea morto.**

**Ni la bulgaraj esperantistoj, homoj de bona volo, postulas ĉesigon de la freneza vetarmado, kiun vi trudas al la popoloj de la mondo. Pro la avideco de tiuj, kiuj volas riĉiĝi per preparado al milito estas disipataj miliardaj monrimedoj, tiom necesaj al la homaro por konstruado de lernejoj kaj hospitaloj, loĝejoj kaj fabrikoj, por protektado de la naturo. La supermezura regavido, la imperiistaj ambicioj minacas la ekziston mem de la homa civilizacio.**

**Ni alvokas al komenco de respondeca dialogo, celanta radikalan solvon de la problemoj de malarmado kaj al garantio de internacia fido surbaze de malintensigo de la streĉiteco en la internaciaj rilatoj.**

**La mondo estas en danĝero!**
**Eksplodigi ĝin ni ne permesos!**
**Ni deziras pacon! Ni batalas por paco!**

# INTERNACIA ESPERANTO-KONKURSO DE BOTEV-POEZIO




Plenumantoj el la Grupo por Arta Parolo — Jambol

La pasintjara iniciato de la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio organizi en urbo Vraca recitalon-konkurson de Botev-poezio en la kadro de la tradiciaj festoj en la antaŭvespero de la 2-a de junio — la Tago de Botev kaj de la pereintoj en la batalo kontraŭ la osmana jugo, la faŝismo kaj kapitalismo kaj en la Patrolanda Milito (1944—1945), bonege efektiviĝis. La esprimita bondeziro pri ĝia transformiĝo en Internacian Esperanto-konkurson jam estas realaĵo!

La konkurso havas sian Statuton kaj siajn honorajn protektantojn: la Komitato pri Kulturo, la Centra Komitato de la Komsomolo, la Centra Estraro de BEA, la Supera Teatra Instituto „Kr. Sarafov" kaj la Ĉefa Politika Gvidantaro de la Popola Armeo. Ĵurio el kompetentuloj-reprezentantoj de tiuj ĉi institucioj, aljuĝis valorajn premiojn kaj laŭreatajn diplomojn al la individuaj kaj kolektivaj plenumantoj.

En la konkurso-recitalo povas partopreni bulgaraj kaj fremdlandaj esperantistoj (ne pli ol 35-jaraĝaj) per individuaj kaj kolektivaj (kun ne pli ol 5—6 plenumantoj) plenumoj de Botev-poezio kaj prozo kaj de verkoj de elstaraj bulgaraj revoluciaj aŭtoroj. La individuaj plenumantoj havas je sia dispono 10 minutojn kaj la kolektivaj plenumantoj — 15 minutojn. La gajnintoj de la Granda Premio rajtas preterlasi la unuan gradon en konkurso pri Supera Teatra Instituto kaj konkursi en la ceteraj gradoj. La portantoj de la unuaj premioj havos la rajton sen konkurso studi en la Instituto por Gvidantoj de Amatora Artagado en urbo Plovdiv (specialeco „Belarta Parolo").

La fremdlandaj gastoj-partoprenantoj ricevas Honoran Memorinsignon.

En la ĉi-jara recitalo-konkurso de Botev-poezio, okazinta en la Distrikta Junulara Domo en Vraca je la 29-a de majo, partoprenis 40 individuaj kaj 6 kolektivaj plenumantoj kaj gastoj el USSR, GDR kaj Hungario.

En la plenplena bele ornamita salono regis vera internacia esperanta etoso: sur la brustoj de la ĉeestantoj verdis festivalaj insignoj, rubandoj kaj freŝaj floroj, per kiuj esperantistoj-junpioniroj ilin dekoraciis.

En sia salutparolo ĉe la inaŭguro de la Internacia Konkurso de Botev-poezio la prezidanto de la Distrikta Estraro de BEA en Vraca Stojan Pavunĉev diris: „Ĉu ekzistas bulgaro, kiu ne portis kaj ne portas en sia koro fajrerojn de la Botev-spirito, kiu ne spiris la ŝtorman, sed kristalan aeron de lia poezio? Kie estas batalo kaj kreo — tie estas Botev. Nia nuntempo estas batala kaj krea, tial Ĥristo Botev vivas en ĝi!"



Emil Penjaŝki el Vraca — gajninto de la Unua premio

La organizantoj de la Botev-recitalo devas popularigi ĝin eksterlanden kaj en diversnaciaj esperantaj kaj neesperantaj gazetoj, revuoj, radiostacioj ktp, por konigi al la vasta publiko en multaj landoj tiun originalan kaj gravan aranĝon.

Ni estas ege dankaj al niaj gastamaj kaj sindonaj dommastroj-organizantoj pro ilia kortuŝa ĝentileco kaj ni esprimas la konvinkon ke la sekvanta Esperanto-konkurso de Botev-poezio estos larĝskale internacia.

Vraca — Sofio,
majo, 1982

**DONĈO ĤITROV**

Tiuj ĉi vortoj esprimis la celojn de la konkurso: popularigi la senmortan verkaron de la poeto-revoluciulo Ĥristo Botev en nia lando kaj eksterlande; plialtigi la nivelon de belarta kreado de la bulgara esperantista junularo; helpi la popularigon kaj la disvastigon de la Internacia Lingvo Esperanto en nia lando.

Dum la tuta tago sur la scenejo aperadis individue kaj kolektive junpioniroj, gimnazianoj, gejunuloj kaj civitanoj, kiuj deklamis la emociigajn poemojn de Botev „Hajdutoj", „La pendumo de Vasil Levski", „Mia preĝo", „Elegio", „Al mia patrino" k. a.

**Docento BELKA BELEVA — prezidantino de la ĵurio:**

**„La premioj ĝenerale estas justaj kaj kuraĝigaj, sed ili estas ankaŭ motivo por fari iujn rimarkigojn, kiujn mi konsideras necesaj kaj utilaj. Laŭ la Statuto — anticipan elekton de plej bonaj plenumantoj en Botev-konkurso devas fari kompetenta komisiono. Ankaŭ en Vraca, samkiel en la Nacia Revuo de E-kanto kaj Parolo en Pleven ĉi-jare, ni konstatis iujn mankojn de la artisma prezentado, lingvajn kaj aliajn malperfektaĵojn — neadekvatai gestoj, superflu- patoso, malbona prononcado kaj redukto de vokaloj, primitiva interpretmaniero ĉe iuj kolektivaj plenumoj. Ĉio ĉi malfavore impresas ne nur la specialistojn, sed ankaŭ la neesperantistan publikon, kiu ofte pritaksas niajn kapablojn kaj Esperanton en similaj aranĝoj. Denove ni substrekas la neceson de kompetenta helpo al la partoprenantoj en konkursoj, revuoj ktp. fare de specialistoj — reĝisoroj, profesiaj aktoroj, pedagogoj, E-instruistoj, por ke nia prezento en naciaj kaj internaciaj artaj aranĝoj estu vere altnivela kaj alloga; ke ĝi estu modelo pri la eblecoj de Esperanto."**

## LA PREMIITOJ EN LA KONKURSO

### I. INDIVIDUAJ PLENUMANTOJ

**LA GRANDA PREMIO** — ne estas aljuĝita.

**LA UNUA PREMIO** — laŭreata diplomo kaj objekta premio ĝis 80 levoj estas aljuĝita al EMIL PENJAŜKI el Vraca pro majstra plenumo de la Botev-poemo „Mia Preĝo"

**DUA PREMIO** — laŭreata diplomo kaj objekta premio ĝis 60 levoj estas aljuĝita al:

**Antoaneta Panova** — Gorna Orjahovica
**Ĵorĵeta Zdraveva** — Sofio
**Evelina Mineva** — Sofio

**TRIA PREMIO** — laŭreata diplomo kaj objekta premio ĝis 40 levoj estas aljuĝita al:

**Ivanka Todorova** — Pavlikeni
**Nikolina Takova** — Ĉepelare
**Aneta Donovska** — Vraca

**TRI INSTIGAJ PREMIOJ** — laŭreataj diplomoj kaj objektaj premioj ĝis 10 levoj estas aljuĝitaj al:

**Ivelina Angelova** — Sofio
**Cvetana Ninova** — Vraca
**Anelia Zlatanova** — Gabrovo

**KVIN PREMIOJ** de la Distrikta Komitato de Pacdefenda Movado po 20 levoj oni aljuĝas al:

**Silvia Ĥristova** — Gabrovo
**Tanja Vaĉeva** — Svoge
**Maria Staneva** — Plovdiv
**Pavlina Makaveeva** — Levski
**Milena Petrova** — Sviŝtov

**TRI PREMIOJ de „Bulgara Esperantisto"** — jarabonoj por 1983, oni aljuĝas al:

**Venelin Draganov** — Vraca
**Mariana Getova** — Botevgrad
**Veselijka Vladislavova** — Pleven

**TRI PREMIOJ** de la Distrikta Estraro de BEA — Vraca, (libroj) oni aljuĝas al:

**Nadka Daskalova** — Ĉepelare
**Irena Ruseva** — Gabrovo
**Pepa Ivanova** — Rudozem

### II. KOLEKTIVAJ PLENUMANTOJ

**1. OBJEKTAJ PREMIOJ** je komuna kosto de 60 levoj — al ĉiuj plenumantoj de Grupo por Arta Parolo — Jambol

**2. OBJEKTAJ PREMIOJ** je komuna kosto de 50 levoj — al ĉiuj plenumantoj el grupo „Steleto" — Kjustendil

# PRI E-SEMINARIO EL TRI VIDPUNKTOJ

Nia redakcia teamo venis en la Internacian Esperanto-Kursejon en vilaĝo Pisanica por partopreni kaj respeguli sur la paĝoj de „BE" la seminarion por aktivuloj de BEA el la tuta lando. En tiu dutaga seminario, okazinta je la 15—16 de majo j. k. oni traktis iujn el la plej gravaj problemoj de nia E-movado, de kies solvo dependas la plua sukcesa disvolviĝo de Esperanto en nia lando.

## NIA INSTRU-METODIKA LABORO

En sia instrukcia parolado Kunĉo Valev, ĝenerala sekretario de CE de BEA, starigis klare kaj kategorie la plej gravajn taskojn de nia estonta agado.

Sendepende de la atingitaj sukcesoj — la enkonduko de Esperanto en pli ol 25 naŭaj klasoj de ĉiuspecaj mezlernejoj kaj la vaste organizitaj kursoj por instruistoj de Esperanto, nun la tasko estas — en 1983 organizi kursojn minimume en 3 lokoj en ĉiu distrikto kaj en Sofio — en 5-10 lokoj. La oficiala enkonduko de Esperanto ankaŭ en la 10-jn klasojn garantios dujaran lernadon, kio povas esti vere rezultodona. BEA preparu eldonadon de sufiĉa kvanto da lernolibroj por kontentigi la bezonojn. Krome, oni devas sendi spertajn instruistojn al la specialaj E-kursoj en la Centra Instituto por Perfektigo de Instruistoj. Kiel modelo tiurilate povas servi la sperto de la Sofia Distrikta E-organizaĵo. Oni devas utiligi plej rezultodone la somerajn feriojn kaj sendi instruistojn en IEK en Pisanica de la 11-a ĝis 30-a de aŭgusto.

Estas dezirinde penetri ne nur en lernejojn kaj institutojn, sed ankaŭ en fabrikojn, entreprenojn, uzinojn ktp, starigi kontaktojn kun laboristoj kaj instrui Esperanton al ili.

La problemo estas ne nur organizi kursojn je kiel eble plej alta nivelo kaj en kiel eble plej granda nombro da lernejoj, institutoj kaj entreprenoj, sed post finiĝo de la kursoj reteni la kursanojn en la vicoj de nia E-movado. Temas precipe pri la gelernantoj kaj la junularo. Ĉar nia movado devas juniĝi!

K. Valev parolis ankaŭ pri la variaj formoj de instrua kaj organiza laboro kun gelernantoj. Liaopinie la plej taŭga organiza formo estus kreo de Esperanto-kluboj en la mezlernejoj kiel kolektivaj membroj de la Kluboj por Internacia Amikeco, kiaj jam delonge ekzistas en la mezlernejoj.

— Ni devas utiligi ĉiujn rimedojn, batali por atingi pli grandskalajn sukcesojn en la disvastigo de Esperanto en nia lando — konkludis k-do Kunĉo Valev.

## VERDA STRATO ANTAŬ LA JUNULARO

Ni komencos per konkludoj. La seminario de aktivuloj de la junulara sekcio de BEA tuŝis gravajn problemojn; ĉu oni utiligis ĉiujn formojn de laboro kun junuloj-esperantistoj? Kiamaniere la junaj homoj povas apliki la Internacian Lingvon en sia fako kaj por siaj interesoj? Kiuj rimedoj estas plej konvenaj por altiro de gejunuloj el ĉiuj sociaj tavoloj al la E-movado? Bazo por diskutado fariĝis la problemoj pri organizado kaj okazigo de E-festivaloj.

— Sendube, tiuj ĉi festivaloj estas bonega formo por ĉiuflanka manifestiĝo de la E-societoj, por kontaktoj kun neesperantistaj organizaĵoj — diris la preleganto inĝ. Petar Todorov — vicprezidanto de CE de BEA. — Sed ni konsideras, ke per altigo de la festivalnivelo ni povas gajni popularecon precipe inter la junularo.

Gravan signifon havas la ĝusta elekto de la festivalaj programoj. Ili devas esti ide kaj estetike bonkvalitaj, konformigitaj al la kapabloj de la plenumantoj. Tiurilate oni ankaŭ serĉu la helpon de spertaj E instruistoj.

Aparte necesa estas la holpo de fakuloj, kiuj povas esti utiligataj kiel konsultantoj por elekto kaj preparo de la programeroj: aktoroj, pentristoj, muzikistoj, reĝisoroj . . .

La reprezentanto de Blagoevgrad — Valeri Miĥajlov, proponis la ideon pri E-partopreno en la tradicia festivalo de politikaj kantoj „Alen Mak" (Purpura Papavo"). Estis diskutitaj vico da aliaj eblecoj por altiro de la junularo al Esperanto: partopreno en la 14-taga turista piedmarŝado tra Pirin-montaro, en la internacia remboata navigado laŭ Danubo, organizado de ekspozicioj sub la aŭspicio de BEA por altiro de junaj pentristoj al la E-movado. Tiujn taskojn transprenos la novefondita Sofia E-Kulturcentro („SEKC"), kiu unuigos la fortojn de la juna bulgara E-intelektularo.

## LA PLANO — GARANTIO PRI REZULTODONA AGADO

Prezidantoj kaj sekretarioj de distriktaj estraroj kaj societoj el la grupo pri organizaj problemoj pridiskutis la laborplanon de unu el la distriktaj estraroj por 1982. Per interesaj proponoj estis pliriĉigita la konkreta kompleksa programo — nova formo de agado en la distriktoj, aplikata dum la lasta jaro.

La sekretario de la Centra Estraro de BEA Dimitar Papazov parolis pri la ĝusta ellaboro de la diversaj planoj — perspektivaj, kurantaj kaj operaciaj kaj pri la neceso de maksimuma konkreteco kaj disaŭdigo de la plano.

La eldiroj de la partoprenantoj — elĉerpaj kaj aferecaj, tuŝis multajn problemojn. La prezidantino de DE de BEA en Ŝumen Veska Dragostinova substrekis, ke tre ofte oni forgesas pri la neceseco de kunlaboro kun la Patrolanda Fronto, la profesiaj unuiĝoj, la Komsomolo. Oni subtaksas la gravecon de la kontaktoj kun la distriktaj komitatoj por defendo de la paco, oni faras seriozajn preterlasojn en la propaganda laboro ĉe la instruado de Esperanto. Petko Bonev, prezidanto de la DE de BEA en Stara Zagora, kie la E-laboro ne estas sufiĉe aktiva, proponis ke la estraroj de societoj kun pli aktiva agado transdonu sian sperton, okazigante parton de siaj kunsidoj en urboj, kie la E-laboro postrestas.

Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj tuŝis ankaŭ la problemon pri altiro de junaj homoj al la E-movado. Nikola Poparov — prezidanto de la DE de BEA en Gabrovo, starigis la demandon pri reteno de la gejunuloj en niaj vicoj post sukcesa fino de la kursoj. Nikola Mitev — sekretario de la DE de BEA en Pernik, parolis pri la nesufiĉa kompreno fare de iuj direktoroj de mezlernejoj al la fakultativa instruado de Esperanto. Anastas Zafirov — prezidanto de la DE de BEA — Miĥajlovgrad, Nikola Najdenov — sekretario de la DE de BEA — Veliko Tarnovo kaj Evtim Anĉev — sekretario de la DE de BEA en Kjustendil emfazis, ke la nesufiĉa nombro da instruistoj estas grava obstaklo por instruado de Esperanto al pli multaj gejunuloj.

Paralele kun la planado tre grava tasko estas ankaŭ la stabiligo de la kolektiva metodo de laboro de la DE, la plibonigo de la organiza kaj kultur-amasa laboro en la societoj.

En la kadro de la seminario oni donis instrukciojn lige kun la plej gravaj taskoj de la distriktaj estraroj de BEA.

Dimitar Papazov parolis pri la organiza stato de la distriktaj E-organizaĵoj. Li tuŝis ankaŭ la problemon pri efikeco de la instruagado.

Oni atentigis ankaŭ pri la grava rolo de la internacia korespondado en la pacbatalo. Per leteroj al siaj amikoj en aliaj landoj la bulgaraj esperantistoj estas veraj propagandistoj de la atingoj de socialisma Bulgario.

Oni emfazis la neceson de interfratiĝo de niaj kaj fremdlandaj asocioj, ĉar Esperanto povas servi kiel lingva ponto ĉe la interŝanĝo de vizitoj.

D. Papazov substrekis, ke estas necese krei kaj konservi la arkivon de la esperantistaj asocioj kaj societoj — protokoloj de kunvenoj, libro de la membroj k. a., kiuj estas fonto pri la historio de la E-movado en nia lando.

Konklude D. Papazov alvokis ĉiujn partoprenantojn en la seminario al aktiva laboro lige kun la solena celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Georgi Dimitrov, la 75-jara datreveno de BEA, la 60-jara datreveno de la Septembra Ribelo kaj la 100-jara datreveno de la kreo de la Internacia Lingvo Esperanto.

**Radi BANĈEVSKI**
**Maria TODOROVA**
**Asen BOJAĜIEV**

---

## TRADICIA VIRINA RENKONTIĜO

La 9-an de majo en amika atmosfero okazis la II Renkontiĝo de la Virina Komisiono ĉe BEA kun la aktivulinoj de naŭ Distriktaj Estraroj de la Asocio.

La renkontiĝon gvidis Lilija Koleva — sekretariino de la fervojista sekcio ĉe BEA.

Pri la laboro de la Virinkomisiono dum la lasta jaro raportis la prezidantino de la komisiono Belka Beleva. Ŝi substrekis la aktivan partoprenon de la virinoj en diversaj enlandaj kaj internaciaj esperantistaj kaj neesperantistaj aranĝoj — en la scienc-praktika konferenco en urbo Ŝumen, en la Universala Kongreso en Brazilo k. a. Multaj estis la artikoloj pri kaj por Esperanto en nia gazetaro, skribitaj de la esperantistinoj. La preparado kaj la festado de la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato pasis ankaŭ sub la signo de la



aktivado de l'virinoj-esperantistinoj. La bonajn rezultojn de la virina agado, k-dino B. Beleva klarigis per la intima kaj tre fruktodona kunlaborado inter la E-Virinkomisiono kaj la Komitato de la Bulgaraj Virinoj kaj ĝia senrezerva helpo. La Virinkomisiono ĉe BEA havas seriozan aŭtoritaton en la Komisiono por Virina Agado (KVA) ĉe UEA. Fine B. Beleva dankis al ĉiuj partoprenintoj en la dumjara aktivado. Vasja Cvetkova rakontis pri kelkaj momentoj el la virinkunvenoj enkadre de la Universala Kongreso en Brazilo pasintjare.

Inĝ. P. Todorov — vicprezidanto de BEA kaj respondeculo en la Buroo de CE de BEA pri la virina agado — salutis la aktivulinojn, alte taksis ilian multflankan laboron kaj bondeziris al ili pluajn sukcesojn.

Agrabla kaj kortuŝa momento en la renkontiĝo estis la celebrado de la 70-jariĝo de k-ino Katja Maneva kaj de ŝia 20-jara esperantista aktivado. Vanja Todorova parolis pri la riĉa vivovojo de k-ino K. Maneva, pri ŝia profesia laboro de pentristino kaj pri ŝia aktivado en la Esperanto-movado.

En siaj eldiroj la partoprenintoj interŝanĝis spertojn pri diversaj organizaj E-problemoj.

Fermante la renkontiĝon, B. Beleva bondeziris al ĉiuj fortojn kaj sanon por atingi novajn sukcesojn en ŝia nobla laboro.

**inĝ. VANJA TODOROVA**

---

## Enlanda movado

# KURSGVIDANTO DIVIDAS SPERTON

La enkonduko de fakultativa lernado de Esperanto en la naŭajn kaj dekajn klasojn de la mezlernejoj postulas urĝan preparon de spertaj kaj rajtohavaj E-instruistoj por la antaŭstaranta lernojaro. Pro tio nia laboro estas direktita precipe al sukcesa plenumo de tiu grava tasko, staranta antaŭ la distriktaj estraroj kaj societoj de BEA.

Jam Esperanton oni lernas fakultative en la faklernejo „Ana Maj", en la mezlernejoj „Liljana Dimitrova" — Plovdiv, en lernejo „Lenin" — Asenovgrad kaj aliloke.

Kune kun la Direkcio pri Popola Klerigado en Plovdiv ni sukcesis organizi forestajn kursojn por profesiaj instruistoj. Por tio multe kontribuis la cirkulera letero dissendita de la Direkcio pri Popola Klerigado al ĉiuj lernejoj en la distrikto de Plovdiv kun anonco kaj alvoko pri partopreno en la kvarmonata foresta kurso en Plovdiv en la klubejo de la DE de BEA.

La rezultoj estis bonaj kaj kuraĝigaj: la unuan lernotagon en la klubejon sur strato „Leonardo Da Vinĉi" 6 venis 22 dezirantoj lerni Esperanton — instruistoj en mezaj kaj elementaj lernejoj de la distrikto. Ilia arda deziro ellerni la Internacian Lingvon kaj pli rapide perfektiĝi kiel estontaj instruistoj rezultis la sukcesan finiĝon de la kurso. Preskaŭ ĉiuj kursanoj montris bonan lingvokonon kaj ekdeziris daŭrigi la studadon en dua kaj tria gradoj, por ke ili komencu instru-laboron kiel kursgvidantoj de Esperanto. Tial multaj el ili jam esprimis firman decidon partopreni ĉi-jare la kursojn en la Internacia E-Kursejo en v. Pisanica.

Malgraŭ niaj sukcesoj antaŭ ni staras seriozaj solvendaj problemoj: ne ĉiuj direktoroj de mezlernejoj, ricevintaj la instrukcian leteron de la Direkcio pri Popola Klerigado, konigis ĝin al la intruistoj en la respektivaj gimnazioj kaj faklernejoj. Pro tio ni estis devigitaj fari apartan inform- kaj propagandlaboron inter niaj personaj amikoj kaj konatuloj-instruistoj. Por la plibonigo de nia instrulaboro ĉiujare ni organizas pedagogian konferencon. Dum la lernojaro oni ofte faras provlecionojn. Ne nur la kursanoj, sed ankaŭ ni — la kursgvidantoj perfektigas niajn konojn kaj instru-sperton. En nia laboro ni strebas apliki nian modestan bazon de instrurimedoj kaj helpiloj: diaskopojn, lumbildojn, diafilmojn, k. a. Ege helpas la pli rapidan ekposedon de la lingvo la libertemaj konversacioj kaj kantoj, la parkera lernado de mallongaj tekstoj, anekdotoj, fabeloj, rakontetoj.

Ni ne forgesas ankaŭ la estontajn instruistojn — la studentojn. Ni jam provis organizi E-kurson en la Plovdiva Universitato „Paisij Ĥilendarski", en la Filologia Fakultato. Tiurilate ni havas bonajn esperojn.

Dum la instruado ni strebas eduki la kursanojn ami Esperanton, ĉar la amo venkas ĉiujn malfacilaĵojn.

**Dimitar ST. DIMITROV**

Finiĝis la lernojaro de E-societo „Ĥristo Botev" ĉe la Ministerio de Transporto. Okazis du kursoj—por komencantoj kaj mezprogresintaj gekursanoj sub la gvido de kamarado Dimitar Borisov. La 19-an de majo okazis ekzameno. Aperis 8 gekursanoj, kiuj faris sukcese la ekzamenon kun tre bona sukceso. La ekzamenkomisiono konsistis el d-ro Stojan Moraresku kaj Dimitar Borisov.

La lernojaro estis fermita je la 26-a de majo dum solena vespero, en kiu partoprenis la gekursanoj kaj la ekzamenkomisiono.

**Svetoslav Manev**

## EKSPOZICIO DE KOLEKTANTOJ EN PLEVEN

La partoprenantoj kaj la gastoj en la XV Nacia Revuo de Esperantaj Kantoj kaj Parolo en Pleven havis la eblecon trarigardi kaj konatiĝi kun iuj el la plej interesaj eksponaĵoj, prezentitaj en la ekspozicio de kolektantoj el Sofio, aranĝita en januaro k. j.

Sur la ekspoziciitaj 30 tabuloj kaj standoj oni konatiĝis pri parto de la esperanta korespondado de Nikola Aleksiev, Marin Marinov, Zora Oŝanska, Rajna Konstantinova, Georgi Litov, Stojan Vasilev k. a. Leteroj, bildkartoj, vidindaĵoj el diversaj partoj de la mondo estis prezentitaj kaj montris al la vizitantoj la eblecojn, kiujn donas al la esperantistoj la Internacia Lingvo por starigi kontaktojn kun samideanoj el multaj landoj, amikiĝi kun alilandaj esperantistoj kaj kune kontribui al la batalo por monda paco, por interkompreniĝo kaj kunlaborado.

**N. L.**

## ESPERANTO KAJ KOOPERATIVOJ

La Bulgara Centra Kooperativa Unuiĝo eldonis en Esperanton la Rezolucion de sia IX-a kongreso, kiu okazis en novembro 1981. Sur 28 paĝoj la rezolucio donas riĉan kaj varian informon pri esperantistoj-kooperativanoj kaj kontribuas al la plua evoluo de la kooperativa movado en nia lando.

# Tra la mondo

Kuba Centra Televido „Revuo de la Mateno" enkondukis Esperanto-emision ĉiusabate laŭ sesa kanalo. Jam kelkfoje la estraranoj de la asocio — inĝ. Andres Rodriguez, Julio Martinez, Gregorio Calabozo kaj Juan L. Besada parolis pri diversaj temoj de la vigla kuba Esperanto-movado.

●

E-klubo „Verda Songo" el Gulbene (Latva SSR) aranĝas je la 28-a de aŭgusto ĉi-jare letervesperon okaze de la sesdeka datreveno de la Soveta Ŝtato.

Ni petas sendi al ni diversajn materialojn pri viaj urboj kaj ŝtatoj: bildkartojn, turismajn prospektojn, poŝtmarkojn, nacilingvajn gazetojn, fotojn de viaj E-grupoj, esperantaĵojn ktp.

Al ĉiu sendo ni reciprokas memoraĵon pri nia urbo kaj insignon, bildkarton kun subskriboj de anoj de nia klubo.

Nia adreso: Sovetunio, Latva SSR, 228700, Gulbene, Kultura domo, Esperanto-klubo „Verda Songo".

●

Okaze de datreveno de la fondiĝo de GDR (la 7-an de oktobro) Lejpciga Laborrondo Esperanto aranĝos letervesperon.

Ni petas niajn eksterlandajn geamikojn sendi al ni salutkartojn, leterojn kaj materialojn por la ekspozicio.

Respondo certa!

Skribu al: LAK ESPERANTO, DDR — 7010, Leipzig, PF 713.

●

---

## NI KONDOLENCAS

Forpasis **Hjusein Merdanov** (5. II. 1908 — 23. IV. 1982) el v. Sevar — distr. Razgrad. Esperantisto de 1929, li estis fervora disvastiganto de Esperanto inter la turka loĝantaro. Hjusein Merdanov estis unu el la fondintoj de la E-societo en Kubrat. Lia filino Halmie Merdanova nun estas E-instruistino en la gimnazio en Kubrat.

Forpasis la aktivulo de Esperanto en urbo Simeonovgrad **Atanas Valĉev Delĉev** (28. 11. 1913 — 15. 4. 1982). Li naskiĝis en vilaĝo Ĉernogorovo, distrikto de Ĥaskovo.

Dum pluraj jaroj A. Delĉev estis ne nur sperta gimnazia instruisto de historio, sed ankaŭ instruis bulgaran lingvon kaj stenografion. Li estis aktivulo de la legosocieto, konata sociaganto. Post la fondo de E-societo „Trakia Lumo" en 1964, li estis regula membro de la estraro. Dum kelkaj jaroj li gvidis esperantajn kursojn. Por longjara sindona E-agado li estis distingita per la Ora insigno de BEA.

La nunaj kaj estontaj esperantistoj en Simeonovgrad neniam forgesos lin!

La 31-an de majo 1982 forpasis **Marinko Ĝjivoje**, sindona kaj longjara membro de la redakta komitato de jugoslava E-revuo „Voĉo", elstara esperantisto mondskala, publicisto, verkisto, bibliografo kaj arkeologo.

Marinko Ĝjivoje havis multajn sincerajn amikojn inter la bulgaraj esperantistoj.

Ni esprimas nian profundan kondolencon al la funebrantaj familioj.

**La redakcio de „BULGARA ESPERANTISTO"**

---

**Sur la unua kovrilpaĝo: Vidaĵo de la somerrestadejo „Albena" ĉe la Nigra Maro.**


**Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV**
**Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI**
**Respondeca sekretario: Lidia RAEVA**
**Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI, prof. Vasil ĈOĈOV, Dimitar ĤAĜIEV, Krastju KARUCIN, Flori NIKOLOV**
**Administranto — Kalinka VASILEVA**

**Revuo „Bulgara Esperantisto" — fondita en 1919, distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio" — I grado. Eldonkvanto 6500.**
**Adreso de la redakcio: „BULGARA ESPERANTISTO**
**Bul. Ĥristo Botev 97, P. K. 66**
**1303 Sofio, Bulgario 1 000 Sofio**
**tel. 31-70-19**
**Presejo „Georgi Dimitrov" (II bazo)**

# ĈARMA LANDO

ISSN—0204—8701

# BULGARAJ NACIAJ PARKOJ



La naturo, la homo kaj la historio naskis tiun ĉi unikan belecon, dank' al kiu Bulgario estiĝis fame konata turisma lando. Ne hazarde tre grava tasko de tutnacia signifo estas la protektado de la naturo en nia lando, de ĝiaj historiaj monumentoj, de ĝiaj riĉaj flaŭro kaj faŭno.

Jen kial estas kreita kaj funkcias nacia sistemo de protektataj de la leĝo naturobjektoj kaj teritorioj sur 129 469 hektaroj.

Plej grandaj laŭ surfaco en Bulgario estas la naciaj parkoj, entute 9, sur areo de 51 295 ha. La naturrezervejoj en la lando estas 85 kun areo de 55 290 ha, protektataj de la ŝtato lokoj — 394 (16 804 ha.), historiaj lokoj 843 (30 653 ha.). Sub protektado de la ŝtato estas ankaŭ 1 645 multjarcentaj arboj, 64 plantspecoj kaj 452 bestspecoj. Sume en Bulgario ekzistas 3 500 malgrandaj kaj grandaj objektoj protektataj de la leĝo.

La naciaj parkoj en Bulgario ampleksas vastajn regionojn, kies naturbeleco kontribuas por evoluo de la turismo en nia lando. Oni povas viziti la naciajn parkojn kun turisma aŭ sciencesplora celo dum ĉiu tempo kaj sezono, tamen estas malpermesate difekti la naturon, kaŭzi malutilon al ĝi.

La plej malnova nacia parko en Bulgario „Vitoŝa" estis kreita en 1933. Karakterizaj por ĝi estas la „rokaj" riveroj (morenoj)—sedimentoj de la glacia periodo, transportitaj de rapidfluaj montriveroj kaj submetitaj al la konstanta efiko de l' ventoj. La konata platajo de Vitoŝa situas je 1800—2000 m super la marnivelo kaj plejparte estas kovrita de torfejoj. En parko „Vitoŝa" estas pli ol 2 700 plantspecoj. Tie ĉi vegetas la rara taksusarbo, multaj kaj variaj floroj — printempa krokuso, Vitoŝa-tulipo, daturo... Tie ĉi nestas multaj birdoj, ĉirkaŭ 320 specioj.

Plej granda en Bulgario estas la nacia parko „Pirin". Ĝi okupas terenon de 26 480 ha kaj ampleksas pli ol la duonon de la suma teritorio de ĉiuj naciaj parkoj en nia lando. Ĝi situas en la plej pitoreska bulgara montaro kun karaktera alpa reliefo. La parko estas fama per siaj fabele belaj glacidevenaj lagoj (pli ol 176), per siaj multjarcentaj arbaroj, kie kreskas la blanka kaj nigra montaraj pinarboj. Tie troviĝas la plej maljuna arbo en Bulgario — la „Bajkuŝev-piceo".

La nacia parko „Ora Strando" situas nord-oriente de Varna kaj okupas la teritorion de la rokformajoj de la Frangana platajo ĝis la Nigra Maro. Tiu ĉemara parko estas 7 km longa kaj 1,3 km larĝa. Sur ĝia teritorio troviĝas maljuna larĝfolia arbaro, kun varia grimpanta kreskajaro, kiu bone kombiniĝas kun la bela strando kaj la modernaj konstruajoj de la somerrestadejo.

Alia nacia parko ĉe la bulgara marbordo estas „Ropotamo". Ĝi situas laŭ la malsupra fluo de la samnoma rivero. Ĝi okupas ne grandan teritorion — ĉirkaŭ 850 ha, sed tie estas densa arbaro kaj rokaj formajoj, kaj marĉoj, en kiuj vegetas raraj kreskajoj kaj floroj.

Ĉiu el la ceteraj kvin rezervejoj estas same tiel bela kaj altiras multnombrajn turistojn. Nacia parko „Rusenski Lom" situas ĉe riveroj Cerni Lom, Malki Lom kaj Beli Lom. Dank' al la majesteco de siaj belaj rivervaloj, markoloj kaj kanjonoj ĝi estas tre populara inter la naturamantoj. Sur la teritorio de la rezervejo troviĝas ankaŭ antikvaj historiaj monumentoj: la fortikajo Ĉerven kaj la enrokaj preĝejoj en la najbara vilaĝo Ivanovo. Sur la nordaj deklivoj de Balkanmontaro situas la originala nacia parko „Etara" — vera subĉiela etnografia muzeo meze de vasta kelkjarcenta fagarbaro. Ĉe la fontoj de rivero Ĉerni Osam, en la Balkanmontaro apud urbo Trojan, situas la belega parko „Steneto". Tien ĉi la turistojn altiras tre interesa natura vidindajo — intermonto kun vertikalaj rokoj, akvofaloj, abismoj kaj kavernoj. En la ĉirkaŭajo de urbo Sliven troviĝas la nacia parko „Bluaj Rokoj", kies fierajo estas la mirindaj rokformajoj, pratempa fagarbaro, akvofontoj. Ĝi estas konata ankaŭ kiel historia loko, kie sin kaŝis hajdutoj. En la centra parto de Rodopi-montaro situas nacia parko „Rodopi". En proceso de formado kaj projektado estas la deka nacia parko en Bulgario — „Centra Balkanmontaro".

**Vasil PETROV**